

## Ĉu Turkoj povas lerni Esperanton?

– Egaleca kaj Negativa komparacioj, elativo kaj ekscesivo –

Gerald TUCKER

### Komparacio de egaleco

Kiam necesas esprimi simplan komparon inter du proksimume egalecaj personoj, objektoj, fenomenoj aŭ ecoj, la turka plej ofte uzas la postpoziciojn “*gibi*” kaj “*kadar*”.

Se temas pri *speco* aŭ *simileco*, uziĝas “*gibi*”:

*aslan gibi bir adam* = viro **kiel/kia** leono

Por komparoj en la senco de *grandeco*, *mezuro*, *kvanto* aŭ *grado* la turka preferas “*kadar*”:

*aslan kadar kuvvetli* = **forta kiel** leono / **leone** forta

Uzate ankaŭ kiel konjunkcio, “*kadar*” krome indikas komparon inter du ecoj:

*Aydın, Zafer kadar intizamlı değil.* = Aydın ne estas **tiel / tiom** ordema **kiel / kiom** Zafer.

Ekzemploj el *Wendt / Caner, “Langenscheidt’s Praktisches Lehrbuch Türkisch”, 1972 (1979, p.222-223)*.

### Komparacio de egaleco en la angla lingvo

Uzante la suprajn ekzemplojn el la turka oni trovas ĉe la angla jenajn respondajn formojn:

*a man like a lion*

*as strong as a lion*

*not so orderly / tidy as* (usone: *not as orderly / tidy as*).

Fonto: *Bruckemaier, Pons Grammatik kurz & bündig Englisch, Ernst Klett Verlag, Stuttgart, 2008*

### Komparacio de egaleco en Esperanto

En la supraj ekzemploj la eblecoj de Esperanto estas demonstritaj. La paro **tiel / kiel** ofte respondas al “*gibi*” kaj al “*kadar*” en konjunkcia senco, **tiom / kiom** al “*kadar*”. La paro **tia / kia** estas por turkoj la plej malfacila formo pro la adjektiva formo kun nom-

bra kaj kaza akordo, sed ankaŭ estas ofte evitebla.

Fonto: *Kalocsay-Waringhien, Plena Analiza Gramatiko de Esperanto, Universala Esperanto-Asocio, Roterdamo, 1980*

### Komparacio de egaleco en la franca lingvo

Laŭ la vidpunkto de la nombro da formoj la franca estas unua-  
vide sufiĉe simpla.

*Ma robe est aussi belle que la vôtre.* = Mia robo estas **tiel** bela **kiel** (la) via. (el: *Blanche, “Französische Grammatik leicht verständlich für jedermann”, 1967, p. 116*).

Kiel kutime la franca postulas la ligoregulon “*liaison*” (est antaŭ vokalo) kaj havas apartan prononcan karakteron (*aussi* [‘osi]), do rilato de 5 grafemoj : 3 fonemoj.

La ekzemploj el la turka montras jenajn respondecajn:

*un homme comme un lion*

*aussi fort qu’un lion*

*Aydın n’est pas aussi ordonné que Zafer.*

Sen eniri la temon de sintakso oni tamen rimarku la mallongigon “*qu’un*” (< *que + un*) kaj la ligoregulon ĉe “*pas aussi*” [pazo’si] (kiu en la ĉiutaga lingvo ne plu estas tiel rigore obeata). Kompreneble validas la reguloj de akordo.

Fonto: *Forst, Pons Grammatik kurz & bündig Französisch, Klett Verlag, Stuttgart, 2005*

### Komparacio de egaleco en la germana lingvo

La turkaj ekzemploj prezentas en la germana jenajn bildojn:

*ein Mann wie ein Löwe*

*so stark wie ein Löwe*

*Aydın ist nicht so ordnungsliebend wie Zafer.*

Pro tio ke la adjektivoj en la komparacio de egaleco en la germana estas uzataj plejparte predikate, la akordo ne ludas tro grandan rolon. Krome atributaj adjektivoj ofte postulas alian sintakson.

Malgrandan rolon ludas ankaŭ la prononco de “s” [z], “w” [v] kaj “ie” [i:], kiuj devus esti jam regataj en ĉi tiu stadio de lernado.

Fonto: *Griesbach/Schulz, Deutsche Sprachlehre für Ausländer, Max Hueber Verlag, München, 1967/68*



## Komparacio de egaleco en la hispana lingvo

La hispana donas al la turkaj ekzemploj jenan aspekton:

*un hombre como un león*

*tan fuerte como un león*

*Aydın no es tan ordenado como Zafer.*

La reguloj pri akordo validas.

**Fonto:**

Segoviano, *Pons Grammatik kurz & bündig Spanisch*, Klett Verlag, Stuttgart, 2008

## Komparacio de egaleco en la rusa lingvo

En la rusa la ekzemplaj frazoj fariĝas ĉi tiaj:

человек **как** лев [ĉila'vjek kak ljev]

**так же** сильный **как** лев [tak'je 'siljnij kak ljev]

Айдын не **так** аккуратен **как** Зафер. [aj'dın nji tak aku'ratjin kak za'fjer]

Ne nur validas la akordado, ankaŭ en multaj kazoj bezoniĝas la "mallonga" formo de la rusa adjektivo.

| Lingvo    | Nombro da variantoj | Nombro da silaboj | Orto-<br>grafiaj<br>apart-<br>aĵoj | Ak-<br>cento<br>ludas<br>rolon | Akor-<br>do<br>ludas<br>rolon | Σ    | Tur-<br>ka | Ran-<br>go |
|-----------|---------------------|-------------------|------------------------------------|--------------------------------|-------------------------------|------|------------|------------|
| Turka     | 2                   | 1,5               |                                    |                                |                               | 3,5  |            |            |
| Angla     | 2                   | 1,5               | 2                                  |                                |                               | 5,5  | 2          | 1          |
| Hispana   | 1                   | 2                 | 1                                  | 1                              | 2                             | 7    | 3,5        | 2          |
| Germana   | 1                   | 2                 | 3                                  |                                | 1,5                           | 1,5  | 7,5        | 3          |
| Esperanto | 3                   | 6                 |                                    | 1                              | 2                             | 12   | 8,5        | 4          |
| Franca    | 2                   | 4                 | 3                                  | 1                              | 2,5                           | 12,5 | 9          | 5          |
| Rusa      | 2                   | 6                 | 1                                  |                                | 4                             | 13   | 9,5        | 6          |

**Fonto:** Müller, *English-Russian Dictionary*, E. P. Dutton & Co., New York, 1959

## Negativa komparacio

Por la negativa komparacio la turka bezonas la ablativan **sufikson** *-den* (variaĵoj: *-ten/-dan/-tan*) kaj **postpozicion** *aşağı* = „de ... suben. La hindeŭropaj cellingvoj siaflanke senescepte uzas vorton kiu signifas „malpli“ kaj kiu antaŭmetiĝas al la adjektivo. Laŭ G. L. Lewis, „Teach Yourself Turkish“, *English Universities Press*, 1953, ankaŭ en la turka tio eblas:

| lingvo    | komparativo           | superlativo  |
|-----------|-----------------------|--|
| angla     | <i>less</i>           | <i>the least</i> [li:st]                                 |
| Esperanto | malpli                | la malplej   |
| franca    | <i>moins</i> [müë(z)] | <i>le/la/les moins</i>                                   |
| germana   | <i>weniger</i>        | <i>der/die/das/dem/den/des wenigste(n); am wenigsten</i> |
| hispana   | <i>menos</i>          | <i>el/la/los/las menos</i>                               |
| rusa      | менее [ˈmjenjiji]     | наименее [najiˈmjenjiji]                                 |
| turka     | <i>daha az</i>        | <i>en az</i>   |

Estis tre malfacile, eĉ en Interreto, trovi informojn pri ĉi tiu fenomeno en la turka. Tamen, laŭ *Tekinay* k. a. (*Pons Standard-wörterbuch Türkisch-Deutsch / Deutsch-Türkisch*, Klett-Verlag, 2002) la supre entabeligita strukturo estas ĝusta. Laborante per la supraj datenoj, ni povas kalkuli ĉe la angla lingvo 2 kontraŭsistemajn elementojn kaj 1 nefidindan ortografiaĵon (*ea* > [ij]). Aldoniĝas la turkfremda fonemo [ö]. La negativa komparativa morfemo estas unusilaba, la superlativa dusilaba kaj duvorta. (11 elementoj)

En Esperanto turko konfrontiĝas kun la „mal-“ funkcio, kiu ĉe la negativa komparacio iom strange efikas sed al kiu estas pro ĝia laŭsistemeco facile alkitimiĝi. Ortografiaj problemoj ne prezentiĝas. Nur tiu 1 elemento kies funkcio ĝis la eklerno de la komparacio jam estas konata, uziĝas en maniero por turko nove lernenda. Krome en Esperanto la superlativo postulas la difinan artikolon „la“. La negativa komparativa morfemo estas dusilaba, la superlativa trisilaba kaj duvorta (9 elementoj).

Apud la por turkoj ege devia uzado de la latina alfabeto en la franca komparacia vorto „*moins*“, kiu krome bezonas la „ligoregulon“ (*liaison*), la superlativo ankaŭ postulas la difinan artikolon, kiu havas tri formojn en ĉi tiu lingvo. (13 elementoj)

En la komparacio la germana ne prezentas al la turka lernanto grandajn fonologiajn problemojn – la grafemo „w“ estas facile alproprigebla. Escepte ke ĝi estas trisilaba, la negativa komparacio ankaŭ estas relative simpla – malgraŭ la unuasilaba akcento.

La superlativo, siaflanke, estas kvarsilaba. Kiel en la angla, Esperanto kaj la franca, ĝi bezonas la difinan artikolon, kiu havas 6 formojn (laŭ genro nombro kaj kazo). Predikate la negativa superlativo havas la formon „*am wenigsten*“, kvarsilaban. (18 elementoj)



La hispana, kontraŭe al la franca, ne prezentas ortografiajn aŭ fonologiajn apartaĵojn, havas komparacion dusilaban kaj superlativon trisilaban kaj kvarvariantan difinan artikolon. Kontraŭ-sistemajn elementojn la hispana negativa komparacio ne altrudas. (12 elementoj).

La rusa negativa komparacio havas trisilaban komparativon kaj kvinsilaban superlativon. La kirila alfabeto prezentas ĉe neakcentataj silaboj la kutimajn, tamen por turkoj nekutimajn ŝanĝojn (e > i). Nur tri el la uzataj kirilaj literoj havas (parte) tipe latinan prononcon (м, е, а), kvankam nur unu (и [(j)i]) estas tute fremda. La resta (н [n]) havas kontraŭlatinan prononcon. ( 14 elementoj)

Tabele ni trovas jenon distribuon:

| Distingaĵoj            | Lingvoj |       |           |        |         |         |      |
|------------------------|---------|-------|-----------|--------|---------|---------|------|
|                        | Turka   | Angla | Esperanto | Franca | Germana | Hispana | Rusa |
| kontraŭsis-temaj elem. |         | 2     |           | 1      |         |         |      |
| kontraŭla-tina ortogr. |         | 1     |           | 2      |         |         | 3    |
| eksterturkaj fonemoj   |         | 1     |           | 1      |         |         |      |
| silabnombro            |         |       |           |        |         |         |      |
| komparacio             | 3       | 1     | 2         | 1      | 3       | 2       | 3    |
| superlativo            | 2       | 2     | 3         | 2      | 4       | 3       | 4    |
| vortnombro             |         |       |           |        |         |         |      |
| komparacio             | 2       | 1     | 1         | 1      | 1       | 1       | 1    |
| superlativo            | 2       | 2     | 2         | 2      | 2       | 2       | 1    |
| variantoj              | 2       | 1     | 1         | 3      | 8       | 4       |      |
| sumoj                  | 11      | 11    | 9         | 13     | 18      | 12      | 14   |

En la distingaĵo „variantoj“ inkludiĝis la diversaj formoj de la difina artikolo ĉe tiuj hindeŭropaj lingvoj kiuj tian posedas. En la turka temas pri la duparta postpozicio kun ablativo. Komparante la suprajn sintakse tre similajn formojn laŭ ilia amplekso ni povas konstati jenan rangordon por la negativa komparacio:

- 1 Esperanto
- 2 Angla
- 3 Hispana
- 4 Franca
- 5 Rusa
- 6 Germana

Estas okulfrape, ke la sumo ĉe la turka kaj la angla estas identa kaj ke Esperanto kiel sola cellingvo havas malpli altan sumon ol la turka.

### Elativo\*

La elativo diferencas de la nura emfaza (fortiga) elemento per tio, ke ĝi ofte ne estas analiza (tre), sed vortmodifa (-eg-). Por simpla emfazo de adjektivo la turka kontentiĝas per la vorto „çok“, t. e. „multe/a/o“. Estas kurioze ke el la cellingvoj nur la hispana elektis similan vojon.

|            |                     |   |
|------------|---------------------|---|
| Angle:     | <i>very</i> [ˈveri] | < oldfranca <i>verai</i> (prasence: „vere“) |
| Esperante: | tre                 | < franca <i>très</i> (samsignifa)           |
| France:    | <i>très</i> [tre]   | < latina <i>trans</i> (prasence: „trane“)   |
| Germane:   | <i>sehr</i> [ˈzeə]  | (prasence: „dolore, vunde“)                 |
| Hispane:   | <i>muy/mucho</i>    | < latina <i>multus</i> (prasence: „multe“)  |
| Ruse:      | очень [ˈoĉinʲ]      | < oko okulo (prasence: „videble“)           |

### Fontoj:

Por la angla: Webster's New Encyclopedic Dictionary, aktualigita eldono de 1996, Black Dog & Leventhal Publishers Inc., Novjorko; p. 1158

Por Esperanto: *Vilborg*: Etimologia vortaro de Esperanto, Volumo 5: S–Z, Eldona Societo Esperanto, 2001, Stokholmo; p. 98

Por la franca: *Picoche*: Dictionnaire Etymologique du français, les usuels du Robert, 1983 (1989), Parizo; p. 668

Por la germana: *Kluge*: Etymologisches Wörterbuch der Deutschen Sprache, 1989, Walter de Gruyter, Berlino; p. 664

Por la hispana: *Lausberg*: Romanische Sprachwissenschaft II (vol. 250), Sammlung Götschen, Berlino, 1967; p.45, n-ro 413

Por la rusa: Шанский/Иванов/Шанская: Краткий этимологический словарь русского языка, „Просвещение“, 1975, Moskvo; p. 320

En la turka lingvo la elativo ludas sufiĉe gravan rolon.

Ekzistas analizaj formoj de la elativo kiuj uzas la partikolon *pek* = „ege, sufiĉe, tute, tre“, la vortparon *pek çok* = tre multe, sufiĉe multe“, kaj la duobligon *çok çok* = „tre(eg)e“.

*çok* (*güzel*) = „tre (bela)“

*pek çok* (*lezzetli bir yemek*) = „tre (bongusta manĝaĵo)“

*pek* (*taze bir yumurta*) = „tute (freŝa ovo)“.

Ankaŭ per duobligo de adjektivo eblas atingi elativan funkcion: *iri iri* = „dikega, tre dika“

\* **Elativo** = Formo de la komparacio kiu esprimas kelklingve 1) transsuperlativan determinon de adjektivo aŭ adverbo aŭ 2) uzon de la superlativo por determini alian adjektivon aŭ adverbon.



*kırmızı kırmızı* = „ruĝega, **tute** ruĝa“

*düz düz* = „rektega, **tute** rekta“

*İri iri karpuzlar aldım.* = „Mi aĉetis dikegajn / **tute** dikajn akvo-melonojn“.

### La elativo en la turka

La duobligo esprimas ankaŭ fortan emocian senton:

„*Memleketimin kara kara üzümlelerini yemek, serin serin sularını içmek istiyorum.*“ = „De mia hejmlando la **nigregajn** vinberojn manĝi, ĝian **freŝegan** akvon trinki mi volas.“

La duobligo ofte estas esprimebla en la cellingvoj nur per apartaj idiomaĵoj:

yeşil yeşil ağaçlar =

Angle: *nothing but green trees*

Esperante: **nenio alia ol/krom verdaj arboj, unu verda arbo post la alia**

France: *ne ... qu'arbres verts*

Germane: *lauter grüne Bäume* (laŭsence la plej trafa)

Hispane: *no ... que árboles verdes*

Ruse: *всё зелёные деревья*

„*İlkbaharda sarı sarı ve beyaz beyaz çiçekler botanik bahçesinde açar.*“ = „Printempe kreskas en la botanika ĝardeno **precipe flavaj kaj blankaj** floroj.“

Angle: *great numbers of yellow and white flowers*

Esperante: **amasoj da flavaj kaj blankaj** floroj.“

France: *rien que (des) fleurs jaunes et blanches*

Germane: *lauter gelbe und weiße Blumen*

Hispane: *flores no más que amarillos y blancas*

Ruse: *всё жёлтые и белые цветки*

Alia varianto de la duobligado estas la duobligo de la unua silabo kun intermeto de konsonantoj. La intermetenda konsonanto (m, p, r aŭ s) elektiĝas laŭ la konsonanto de la unua silabo:

*mavi* = „blua“ > *masmavi* = „bluega, **tute** blua“

*kırmızı* = „ruĝa“ > *kıpkırmızı* = „ruĝega, **tute** ruĝa“

*düz* = „rekta“ > *dümdüz* = „rektega, **tute** rekta“

*temiz* = „pura“ > *tertemiz* = „purega, **tute** pura“

En la kadro de ĉi tiu studo tio devos sufiĉi, ĉar aliaj pluaj ekzemploj por duobligo ne plu estas elativaj, sed iterativaj. Krome, per kelkaj duobligoj ni forlasus la adjektivan kaj alirus la adverbbon, kio poste okazu.

Konstatinte la turkan situacion, konfesinde ne elĉerpe, necesas nun okupiĝi pri la elativo en la cellingvoj, kiu plejparte aŭ ne ekzistas, aŭ nur analize, aŭ en por turkoj tre nekutima maniero esprimiĝas. La nombro da manieroj estas decida por la enrangigo.

Tralaborante la cellingvojn laŭalfabete ni komencos per la angla, kiu, kvankam ege esprimriĉa, la elativon por sia propra lingvo ne konas, sed pro siaj lingvotranspaŝaj kontaktoj ĝin en aliaj lingvoj ekkonis.

### La elativo en la angla

Propran elativon la angla ne posedas, eĉ ne vorton por ĝi. En la interreta „*Wiktionary*“ troviĝas la vorto „elative“, kiu mankas en *Webster* (1993). Nek *Chomsky*, nek *Whorf*, nek *Lyons* mencias ĝin (en la literaturo je mia dispono).

„*Wiktionary*“ okupiĝas precipe pri la elativo de la semitaj lingvoj, kiu estas „kombinaĵo de la komparativo kaj superlativo“. Kiel ekzemplon ĝi nomas la araban „*ka'bi:r*“ = „granda“ kun sia elativo „*akbar*“ = „la plej granda“. La reta artikolo estis prilaborenda pro ioma defecito de kredebleco\*, prezentante la arabajn vortojn en la malĝusta vicordo kaj dise, anstataŭ uzi la konektajn formojn: „*kabir*“ > *كبير*, anstataŭ *كبير*; „*akbar*“ > *أكبر* anstataŭ *أكبر*. (Rimarko: Tiu manko estas intertempe korektita).

Restas la fakto ke la elativo kiel fleksia formo en la angla ne ekzistas. La formoj estas analizaj, ofte adverbaj. *Extremely, particularly, especially* ktp. plenumas kvazaŭ-elativan funkcion. Eĉ la uzado de la superlativa morfemo *most* („*most amusing*“) sen artikolo estas preskaŭ limita al la britoj, kiuj estas preskaŭ minoritato en sia lingva teritorio. Konsiderante la fakton ke en la turka ekzistas morfologie apenaŭ diferenco inter adjektivoj kaj adverboj, la esprimo de elativoj en la angla prezentas sufiĉe grandan problemon.

### La elativo en Esperanto

En Esperanto la elativo estas nekonata, sed, laŭ la opinio de la aŭtoro de ĉi tiu studo, je dispono. Ĝia produktiveco estas nur limita per pluraj aliaj funkcioj kies influo dependas de ĝia uzebleco ĉe aliaj vortspecoj ol la adjektivo/adverbo. Temas pri la sufikso *-eg-*. Laŭ la hispana parolmaniero ĝi povus nomiĝi **absoluta superlativo**.



En la parto pri la turka elativo estas kelke da ekzemploj, en kiuj Esperanto uzas ĉi tiun elementon. Fundamente ĝi havis la taskon redukti la nombron da lernendaj radikoj (kiel multaj esperantlingvaj sufiksoj), do en vortoj kiaj *varmega* ne povas plenumi elativan funkcion, ĉar la sufikso formas fortigon de la radiko *varma*, vortparo en la cellingvoj reprezentata per malsamaj vortoj. La solvo estas analiza: elative la sufikso fariĝas adverbo *ege* kaj tiel fortigas siaflanke la sufiksumitan derivaĵon: *ege varmega*. En la turka mankas tia elativo.

Ankaŭ en Esperanto okazas silabaj duobligoj, kvankam rare kaj nur ĉe unusilabaj radikoj. Tial ne necesas intermeti iujn ajn kromliterojn. Unu el la plej ofte uzataj estas *plenplena*, kiu eĉ estas plifortigebla per *-eg-*: *plenplenega*. La duobliga sistemo de Esperanto estas tro malofte uzata por tute respondi al la turka.

Kelkaj Esperantistoj uzas la superlativan *plej* sen la difina artikolo (kp. la anglan). Pro tio ke la turka ne havas difinan artikolon, tiu metodo por formi elativon ne estas je dispono. La turka ankaŭ ne havas vorton por “plej”.

Fine ankaŭ la esperantlingva sistemo de adverba elativo, ekz. tute, estas por turkoj verŝajne la plej uzebla, ĉar ankaŭ vortoj kiaj *fazla* havas similan funkcion. Krome ĝi postulas malgrandan lernklopodon.

### La elativo en la franca

La interretaj fontoj pri la elativo en la franca okupiĝas ne pri franca elativo, sed pri la araba kaj la germana elativoj. En la angla kaj germana partoj ties formoj estas konstateblaj. La franca elativo do havas nomon (*élatif*), sed ne formon. La intensivigo de la franca adjektivo esprimiĝas ne per fleksio sed per analizaj elementoj plejparte plursilabaj, ekz. adverboj. La adjektiva sistemo ankaŭ inkludas latinajn elativojn kun adjektiva karaktero (vd. parton “La adjektivo – la komparacio de kvar cellingvoj por turkoj”).

### La elativo en la germana

Kiel en aliaj hindeŭropaj cellingvoj, en la germana la elativo esprimiĝas per la superlativo sen difina artikolo, kiu funkcias adverbe, modifante adjektivon. Temas do pri fleksia / analiza formo. Ekzemple malmodernaj ĝentilaj formoj ĉi-maniere esprimiĝas: “*Ihr gehorsamster Diener*” = “via **plej** obeema servanto”.

Tamen, ankaŭ en relative formalaj modernaj frazoj, senartikola adverbfunkcia superlativo modifas adjektivojn elative: “*Dieses Ergebnis ist höchst erfreulich.*” = “Ĉi tiu rezulto estas **ege** ĝojiga / ĝojigebla.”

Multe da turkaj elativoj estas esprimeblaj en la germana per participoj, ekzemple ĉe turka frazo kun eĉ triobla ripeto de la adjektivo:

“*ışıl*” = “brila”; “*ışıl ışıl*” = “brilega”.

“*Essen şehri her yıl Noel bayramında ışıl ışıl ışıdır.*” =

“*Jedes Jahr zu Weihnachten ist die Stadt Essen strahlend*

*beleuchtet.*” = “Ĉiujare kristnaske la urbo Essen brilega (aŭ:

“radi(ant)e) **brilas**.”

Kelkaj pluj duobligaj funkcioj de la turka estas reprezentablaj en la germana kaj la aliaj cellingvoj, sed ne sammaniere. Ĉu ili vere estas elativaj, estas laŭ la opinio de ĉi tiu aŭtoro pli profunde ekzamenende, ĉar eventuale bezoniĝas aŭ eĉ jam ekzistas propraj fakvortoj por tiuj fenomenoj.

### La elativo en la hispana

Tiu ĉi latinida lingvo havas ankoraŭ produktivan elativon transprenitan senpere de la klasika praulo. Ĝi ankaŭ nomiĝas “absoluta” superlativo kaj estas trisilaba sufikso kun akcento sur la unua silabo: *-ísimo/-ísima*. La sufikso ricevas la regulajn finaĵojn de genro kaj nombro, kaj akordas kompreneble kun la substantivo.

La ekzemploj demonstras la uzadon:

*El hombre estaba tristísimo.* = La viro estis tristega.

*La muchacha estaba tristísima.* = La knabino estis tristega.

*Los hombres estaban tristísimos.* = La viroj estis tristegaj.

*Las muchachas estaban tristísimas.* = La knabinoj estis tristegaj.

La elativo hispana estas ankaŭ prefiksebla: *La chica es requeteguapa.* [rekete'ŭapa] = La knabino estas **ege / eksterordinare** bela. Ankaŭ la duobliga estas uzebla kiel elativo: *Tengo mucha mucha hambre.* = Mi estas malsataga.

Kiel en multaj aliaj lingvoj la latina vorto **super** nuntempe uziĝadas precipe inter la junularo en elativa senco: *Es un coche super chulo.* = Tio estas **superaŭto**.

Kelkaj adjektivoj de la hispana validas jam kiel superlativoj kaj tial ne estas elativigeblaj per la latina sufikso *-ísimo*:



|                   |                    |
|-------------------|--------------------|
| <i>bonita</i>     | = beleta           |
| <i>enorme</i>     | = enorma, grandega |
| <i>fantastico</i> | = fantasta         |
| <i>horrible</i>   | = terura           |

Oni uzas adverbojn kiaj *realmente* aŭ *verdaderamente* por tamen doni al tiaj adjektivoj elativan funkcion.

*La chica es verdaderamente bonita* = La knabino estas vere beleta.

Turka lernanto povas trovi en la hispana kelke da elativaj formoj similaj laŭsence al la propraj. La problemoj komencas ĉe la fleksioj, sed estas parte superblaj, dum parte similaj al tiuj kiujn prezentas la aliaj hindeŭropaj lingvoj.

### La elativo en la rusa

En la rusa lingvo regas la sistemo, ke precipe la tiel nomata “simpla” (t. e. fleksia) superlativo uziĝas elative, dum la normala superlativo estas la “kunmetita” (t. e. analiza kun *более*) superlativo. La “simplaj” formoj tamen ankaŭ ofte estas uzataj, prefere en la skriba lingvo, superlative.

*самый старый* = plej maluna *старейший* = maljunega

Ankaŭ la uzado de la prefikso “*нан-*” kun la “simpla” superlativo plifortigas la signifon de la superlativo, sed ne estas nepre difinebla kiel elativo.

Kompreneble la elativo kaŭzas sufiĉe ampleksan tabelaron. Necesas dedukti elementojn, kiuj estas komunaj en la turka kaj la hindeŭropaj lingvoj, kio iom precizigas la finan rezulton.

### Elativo – tabela superrigardo

T = turka; A = angla; E = Esperanto; F = franca; G = germana; H = hispana; R = rusa

### Interrespondaj formoj:

| T               | A | E | F | G | H | R |
|-----------------|---|---|---|---|---|---|
| duobliga        |   | + |   |   | + |   |
| silaba duobligo |   |   |   |   |   |   |
| sumoj:          | 8 | 6 | 8 | 8 | 6 | 8 |

### Deviaj formoj:

| speco                | A | E | F | G | H | R |
|----------------------|---|---|---|---|---|---|
| prefiksa             |   |   |   |   | + | + |
| sufiksa              |   | + |   |   | + |   |
| superlativa          | + | + |   |   | + |   |
| kun aparta strukturo |   |   |   |   | + |   |
| adverba              | + | + | + | + | + | + |
| fremdvorta           | + |   | + | + | + | + |
| sumoj:               | 4 | 3 | 2 | 2 | 6 | 3 |

### Akordo:

| speco   | A | E | F | G | H | R |
|---------|---|---|---|---|---|---|
| genraj  |   |   | + | + | + | + |
| nombraj |   | + | + | + | + | + |
| kazaj   |   | + |   | + |   | + |
| sumoj:  | 0 | 2 | 2 | 3 | 2 | 3 |

| formoj                  | A  | E  | F  | G  | H  | R  |
|-------------------------|----|----|----|----|----|----|
| Devio + Kongruo         | 4  | 5  | 4  | 5  | 8  | 6  |
| Minus respondaj formoj: | 8  | 6  | 8  | 8  | 6  | 8  |
| Rezulto:                | 12 | 11 | 12 | 13 | 14 | 14 |

### Fleksioj:

| speco   | A | E | F | G | H | R  |
|---------|---|---|---|---|---|----|
| genraj  |   |   | 2 | 3 | 2 | 3  |
| nombraj |   | 2 | 6 | 2 | 5 | 2  |
| kazaj   |   | 1 |   | 4 |   | 6  |
| sumoj:  | 0 | 3 | 8 | 9 | 7 | 11 |

### Rezulto + formoj:

| formoj            | A  | E  | F  | G  | H  | R  |
|-------------------|----|----|----|----|----|----|
| Kune:             | 12 | 14 | 20 | 22 | 21 | 25 |
| Vera elativo:     |    | -1 |    | -2 | -2 | -1 |
| Sen vera elativo: | 2  |    | 2  |    |    |    |
| sumoj:            | 14 | 13 | 22 | 20 | 19 | 24 |



La enrangigo de la lingvoj laŭ relativa facileco de la elativo rezultigas:

- 1 Esperanto
- 2 Angla
- 3 Hispana
- 4 Germana
- 5 Franca
- 6 Rusa

#### Fontoj:

Por la turka: *Benzer*: Eine kontrastive linguistische Darstellung der Adjektive in der türkischen und der Deutschen Gegenwartssprache (Dissertation, Ruhr-Universität Bochum, Bochum, 2000)

Por la angla: <http://en.wiktionary.org/wiki/elativo>

Por la franca: <http://fr.wikipedia.org/wiki/%C3%89latif>

Por Esperanto: *Kalosçay & Waringhien*: Plena analiza gramatiko, UEA, Rotterdam, 1980

Por la germana: *Benzer*: (vd. supre) <http://de.wiktionary.org/wiki/Elativ>  
<http://de.wikipedia.org/wiki/Komparation>

Por la hispana: [http://de.wikibooks.org/wiki/Spanisch/\\_Adjektiv/\\_Steigerung](http://de.wikibooks.org/wiki/Spanisch/_Adjektiv/_Steigerung)

Por la rusa: [http://de.wikipedia.org/wiki/Russische\\_Grammatik#Kurzformen\\_der\\_Adjektive](http://de.wikipedia.org/wiki/Russische_Grammatik#Kurzformen_der_Adjektive)

## La ekscesivo

Esprimi la nocion “tro” por turkoj ne estas facile. En la hindeŭropaj cellingvoj ĝi estas senescepte esprimebla. La turka nur povas proksimiĝi al la senco per la vorto “*fazla*” = ~ “superflua/e, pluso, supergajno” (aŭ “*aşırı*” = “ekscesa/e”). Tial turkoj devas alkutimiĝi al tute nova, ĝis tiam “superflua” nocio. Tio okazos supozeble plej rapide en tiu lingvo kiu prezentas la plej malmultajn akcesorajn parkerigendaĵojn.

La unusilaba angla *too* skribiĝas per duobla “o”, kiu devigas la lernanton elekti el la tri eble prononcoj [u:] (kp *food* “nutraĵo”), [u] (kp *foot* “piedo/futo”) kaj [a] (kp *flood* “diluvo”) kaj parkeri la ĝustan [u:]. Krome necesas memori ke la homofonaj *two* “du” kaj *to* “al” ne taŭgas por esprimi la ekscesivon.

La unusilaba esperantlingva *tro* havas, krom la vortkomenca [tr] (kiun havas ĉiuj cellingvoj) kaj la alofona [r], neniun vere probleman elementon parkerigendan escepte la vorton mem.

La unusilaba franca *trop* devigas kutimiĝi krom al la vortkomenca [tr] kun la guturala franca “r” ankaŭ parkerigi la fakton ke por la muta vortfina “p” ne validas la ligoregulo “*liaison*”.

La unusilaba germana “zu” postulas nur la kutimiĝon al la “z” kun la prononco [c]. Ioma helpo estas la unusilabeco de la supre priskribitaj ekscesivoj. La kvinsilaba hispana *demasiado* estas pro sia longeco ĝenerale relative malfacila por la parkerigo, kvankam ekzistas lernantoj, por kiuj ĝuste tia aparteco estas memorsubtena. La intervokala “lispo” de “d” [ð] ne tro pezas, ĉar ĝi ne estas universala en la hispana, estas tolerata de eksterlingvanoj kaj efikas en receptiva situacio nemalhelpo. La antaŭlastasilaba akcento estas laŭsistema.

La dusilaba rusa *слишком* skribiĝas kirile, havas vortkomencon [sl] eksterturke, kaj pro la parkerigenda unuasilaba akcento, ankaŭ senakcentan “o”, kiu pro la manko de akcento ŝanĝiĝas al [a]. Pro la dusilabeco de “*fazla*” la longeco de la ekscesivoj en la cellingvoj ludas rolon por la enrangigo de la cellingvoj laŭ relativa facileco. Tio esprimiĝas en la suba tabelo, kiu konsideras la nombron da silaboj, la ortografiajn deviojn, la akcenton kaj la fonologiajn apartaĵojn.

## Ekscesivo – tabela superrigardo

| lingvo    | vorto     | silaboj | ortogr. | akcento | fonetiko | sumo | rango |
|-----------|-----------|---------|---------|---------|----------|------|-------|
| Esperanto | tro       | -1      |         |         | 1        | 0    | 1     |
| germana   | zu        | -1      | 1       |         | 1        | 1    | 2     |
| franca    | trop      | -1      | 1       |         | 2        | 2    | 3     |
| hispana   | demasiado | 1       |         | 1       | 1        | 3    | 4     |
| rusa      | слишком   | 0       | 1       | 1       | 2        | 4    | 5     |
| angla     | too       | -1      | 1       |         | 9        | 10   | 6     |

La minusaj nombroj en la kolumno “silaboj” spegulas la fakton, ke la ekscesivo en tiuj lingvoj havas malpli da silaboj ol la turka “*fazla*”. La rusa havas la saman nombron, kaj la hispana pli da silaboj ol la turka.

Resume konstatigu ke la ekscesivo estas nova fenomeno por turklingvanoj kaj ke ĝia ekregio en unu el la cellingvoj estas helpa por la lernado de la nocio en unu, pluraj aŭ ĉiuj ĉi-loke diskutitaj lingvoj. La tabelo montras, kiuj cellingvoj prezentas la plej multajn kaj malmultajn obstakoljn por tiu lernado. Por enrangigi la hindeŭropajn lingvojn, la turka sumo subtrahiĝas de la unuopa cellingva sumo.



**Fontoj:**

Por la turka: *Karayel*: Esperanto-Türkçe Sözlük, (privateldono), Ankara, 1987

Por la angla: *Wells*: The E.U.P. Concise Esperanto and English Dictionary, The English Universities Press Ltd, London, 1969

Por Esperanto: *Semmacieca Asocio Tutmonda*, La nova plena ilustrita vortaro de Esperanto (NPIV), SAT, Parizo, 2002

Por la franca: *Dubois*: Dictionnaire Larousse Français-Anglais Anglais-Français, Pocket Books, Inc., New York, 1954

Por la germana: *Butin & Sommer*: Wörterbuch Esperanto-Deutsch, Limburger Vereinsdruckerei GmbH, Limburg, 1-a eldono (dato ne indikita)

Por la hispana: [http://de.wikibooks.org/wiki/Spanisch/\\_Adjektiv/\\_Steigerung](http://de.wikibooks.org/wiki/Spanisch/_Adjektiv/_Steigerung)  
*Jackson & Rubio*: Spanish Made Simple, New York, 1955

Por la rusa: [http://de.wikipedia.org/wiki/Russische\\_Grammatik#Kurzformen\\_der\\_Adjektive](http://de.wikipedia.org/wiki/Russische_Grammatik#Kurzformen_der_Adjektive)

**Resumo de la relativa facileco de hindeŭropaj adjektivoj por turkaj lernantoj**

Por konstati la finan enrangigojn de la unuopaj hindeŭropaj cellingvoj, necesas kalkuli la averaĝojn de la enrangigoj de ĉiuj cellingvoj.

| Lingvo    | Bazaj formoj | Komparaciaj formoj | Negativaj formoj | Emfazaj formoj | Elativaj formoj | Egalecaj formoj | Sumo |
|-----------|--------------|--------------------|------------------|----------------|-----------------|-----------------|------|
| Angla     | 1            | 5                  | 4                | 2              | 2               | 1               | 15   |
| Esperanto | 2            | 1                  | 1                | 3              | 1               | 4               | 12   |
| Franca    | 5            | 4                  | 3                | 1              | 5               | 5               | 23   |
| Germana   | 4            | 3                  | 6                | 4              | 4               | 3               | 24   |
| Hispana   | 3            | 2                  | 5                | 6              | 3               | 2               | 21   |
| Rusa      | 6            | 6                  | 2                | 5              | 6               | 6               | 31   |

Enrangigo laŭ la averaĝo:

| Lingvo  | Angla | Esperanto | Franca | Germana | Hispana | Rusa |
|---------|-------|-----------|--------|---------|---------|------|
| Averaĝo | 2,5   | 2,0       | 3,8    | 4,0     | 3,5     | 5,2  |

**Enrangigo de la adjektivo**

- 1 Esperanto
- 2 Angla
- 3 Hispana
- 4 Franca
- 5 Germana
- 6 Rusa

(daŭrigota)

<g.tucker@gmx.de>

Aŭtora adreso kaj priaŭtora informo en SR 3/2009, p.182

**Scienca eŝo**

Fonto de la scienc-eŝaĵoj: la datoj (en krampoj) estas la cititaj ŝirfolioj de *Brockhaus*-kalendaro "Kion tiel ne diras la leksikono"

**Damaĝo de la ozontavolo**

Antaŭ ekzakte 150 jaroj, la 1-an de septembro 1859, la brita astronomo *Richard Carrington* (1826-1875) teleskope observis fortegan radiadan erupcion de la suno. Kaj en la sekva nokto la plej forta iam registrita magnet-ŝtormo tempestis ĉirkaŭ la Teron: telegrafiaj lineoj disŝprucis fajrosparkojn kaj kaŭzis incendiojn. Tiam ankoraŭ ne estis mezureblaj la kvantoj da energi-riĉaj partikloj, kiujn la suno disĵetas – precipe protonojn, hidrogen-kernojn, kiuj eklumigas la belegajn polusajn aŭrorojn, sed ankaŭ produktas nitrogen-oksidojn, kiuj detruas la ozonon. Sciencistoj de la Universitato de *Topeka*, Kansaso/Usono elkalkulis, ke post tiu sunerupcio en 1859 en la polusaj regionoj je alteco de 40 km ĉ. 80% de la ozontavolo estis neniigita, kiu regeneris sin nur post tempodaŭro de kvar jaroj. Aparte de tio, ke ni tute ne povas uzi tiuspecan okazantaĵon en nia nuntempa klimatosituacio, iu tia sunerupcio ekstreme skuus nian surteran komunikad-reton kaj eĉ kaŭzus la kraŝan surterenfalon de niaj satelitoj.

(2009-05-31)

**Nigraj pneŭmatikoj**

La poŝto estas flava (almenaŭ en Germanujo, en aliaj landoj eble ruĝa), la herbejo estas verda, la neĝo estas blanka kaj la aŭtomobilaj pneŭoj estas nigraj – tute klare, ĉu? Ne, tute ne klare. Kaŭĉuko origine ja estas hele beja, havas naturan sablokoloron. Kaj por nigrigi ĝin oni aldonas fulgon en la rezulta substanco. Tio komence estis intencita kaj necesa fardo, ĉar fulgo plialtigas la solidecon kaj fortikecon. Sen fulgo la pneŭmatiko foruziĝus – tipe kaŭĉuke – same kiel skrapgumo. La ruzaĵo pri fulga aldono nomiĝas "vulkanizado", eltrovita en 1839 de *Charles Nelson Goodyear*. Sed pasis tre longa tempo, kaj la nunaj pneŭmatikoj estas teĥnike alte evoluigitaj produktoj. Ne plu estas uzata iuspeca fulgo el kamentubo sed normigita industrifulgo kun la tip-numero N 339. Ankaŭ tiu estas intertempe anstataŭigebla, nome per silana silicoacid-kombinaĵo, kiu estas tinkturebla en ĉiujn kolornuancojn. Sed tion neniu volas. Pneŭmatikoj en flava aŭ siringoviola koloroj estas same nevendeblaj kiel en ruĝa, blua aŭ verda koloroj. Oni do, ankaŭ estonte, aldonos fulgon.

(2010-08-26)